

**Otto Prytz**

*(emeritiĝinta el / retired from)*

*Universitetet i Oslo, Norvegio / Norway*

## Vortfarado per dishako de radikoj kaj kungluo de la dishakaĵoj

**Resumo:** Ĉi tiu artikolo komence priskribas kaj klasas kelkajn manierojn formi novajn konceptojn per mallongigo de vortoj kaj vortgrupoj, dediĉante specialan atenton al vortkunmetado per “tondado kaj gluado”. Vortoj formitaj per tiu kunmeta tekniko, praktikata precipe en la angla lingvo, iel similas al etimologie hibridaj radikoj en Esperanto, sed dum ĉi tiuj estas kreitaj kiel nerompeblaj radikoj laŭeble facile rekoneblaj internacie, la unue menciitaj estas kreitaj por esprimi kombinojn de diversaj konceptoj. De la angla lingvo multaj vortoj tonditaj kaj gluitaj estas disvastigitaj al aliaj lingvoj, ĉu kiel kunmetaĵoj laŭ la sama tekniko, ĉu kiel importaĵoj de la kunmetaĵoj mem kiel leksikaj unuoj. Kunmetado per tondado kaj gluado ne laŭas la aglutinan karakteron de Esperanto, sed ĉar tiel estas kreataj multaj vortoj, kiuj rapide akiras internacian uzon, urĝas esplori, ĉu eblas ellabori sistemon – aŭ almenaŭ strategion – por doni taŭgan Esperantan formon al la konceptoj, kiujn la tonditaj kaj gluitaj vortoj esprimas.

**Ŝlosilvorto:** Vortkunmetado; Mallongigo; “Tondado kaj gluado”; Esprimkapablo.

### 1 Enkonduko

Ĉi tiu artikolo komence priskribas kaj klasas kelkajn manierojn vaste uzatajn por mallongigi unuopajn vortojn kaj vortgrupojn, kaj diskutas ilian taŭgecon por Esperanto. Poste ĝi dediĉas specialan atenton al la formo de vortkunmetado koncize priskribita en la titolo de la artikolo. Tia kunmetado estas praktikata precipe en la angla lingvo, kaj de tie ĝi estas disvastigita kaj disvastiĝanta al aliaj lingvoj, ĉu kiel vortkunmeta tekniko, ĉu en la formo de importado de la kunmetaĵoj kiel memstaraj vortoj. Tiu tekniko ne estas enkorpiĝebla en la tradician sistemon de Esperanto. Pro la fakto ke laŭ ĝi estas kreataj multaj vortoj, kiuj rapide akiras internacian uzon, urĝas pripensi, ĉu eblas ellabori sistemon – aŭ almenaŭ strategion – por doni taŭgan Esperantan formon al la konceptoj, kiujn tiuj vortoj esprimas.

## 2 Klasoj de mallongigo

### 2.1 Mallongigo de radiko

Pluraj radikoj relative ofte uzataj havas originan formon pli longan. Pro ilia ofteco oni mallongigas ilin, uzante nur la komencon aŭ la finon de la origina radiko: *Fotografi* mallongiĝas al *foti*; *kinematografio* al *kino*; *aŭtomobilo* al *aŭto*; kaj *aŭtobuso* al *buso*.

Tiaj mallongigoj ĝenerale estas efektive oportunaj en Esperanto. Tamen, ju pli multaj ili estas, des pli granda estas la eblo de konfuzo pro samsoneco. Ekzemple, se oni uzas *aŭto-* kiel (pseŭdo-)prefikson signifantan “per si mem”, “aŭtomate”, *aŭtoveturado* povas signifi “aŭtomatan veturadon” aŭ “veturadon per aŭtomobilo”. Jes ja, la aserto, ke Esperanto apenaŭ havas samsonajn vortojn, evidente estas mito. Ne nur ekzistas samsonaj radikoj: *kaj* / *kaj-o*, *ĉar* / *ĉar-o*, *por* / *por-o*; ekzistas ankaŭ samsonaj vortoj: *poligono* kun sencoj botanika kaj matematika. Tamen, Esperanto estas multe malpli tolerema pri samsonaĵoj ol multaj aliaj lingvoj: *kero* (ludkarta emblemo) havas la saman originon kiel *koro* (organo); *trefo* (ludkarta emblemo) la saman kiel *trifolio* (kreskaĵo); *etikedo* (karteto) la saman kiel *etiketo* (ceremoniaro); por ne paroli pri *polvo*, *puĉo*, *pulvo* kaj *pulvoro*.

La angla, male, estas tre tolerema ne nur pri samsoneco, sed ankaŭ pri plursenceco. Du samsonaj unusilabaj mallongigoj povas havi tre malsamajn originojn; kaj eĉ povas okazi, ke unu vorto kaj unu samsona mallongigo apartenas al la sama sfero. Ekzemplo de tio estas *tab*, kiu en informadiko povas havi du tre malsamajn signifojn. Kiel plena vorto ĝi signifas “langeton”, “disigilon” inter partoj de dialogujo; sed samtempe ĝi estas mallongigo de *tabulator* (la vorto *tabulatoro* ne figuras en PIV: ĉu *tabeligilo*?).

### 2.2 Prefiksigo de la unua elemento

Kelkaj vortoj havas egalan komencon, kiu en la fontolingvo estas aŭ memstara vorto aŭ prefikso. Bona ekzemplo estas *telefono*, *telegrafo* kaj *telegramo*. En tiuj Esperantaj vortoj *tele-* ne estas prefikso, ĉar la resto de tiuj vortoj ne signifas, respektive, “bazon”, “nobelon” kaj “pezon”. Tamen, oni enkondukis *tele-* kiel prefikson en *televideo*, *telekomunikado* k.s.

Tia analogia prefiksigo povas esti ĝena en Esperanto, ĉar oni povas konfuziĝi pri tio, en kiuj vortoj la elemento estas prefikso, kaj en kiuj ĝi apartenas al la radiko. Krome oni povas dubi, ĉu oni en Esperanto rajtas uzi *hiper-*, *hipo-*, *mega-*, *mikro-* kaj *mini-* kiel prefiksojn.

## 2.3 Mallongigoj konsistantaj el la komenca silabo de ĉiu elemento

Moderna ekzemplo de tia mallongigo estas *modemo*, kies angla origino estas *MOdulator-DEModulator*. Tiaj mallongigoj estas relative oftaj, kaj ili originas el diversaj lingvoj. Kiu meze klera homo ne konas la vorton *kolĥozo*, el la rusa *KOLlektivnoje ĤOZjajstvo* (kolektiva mastrumado)? La originon de tiaj mallongigoj eble ne konas eĉ denaskaj parolantoj de ilia fontolingvo. Se oni enketus ĉe denaskaj anglalingvanoj pri la etimo de *modem*, verŝajne nur malplimulto sciis la respondon.

Similan rezulton probable havus enketo inter Esperanto-parolantoj. Tamen, pro la strukturo de tiaj mallongigoj – silabo ja havas unu vokalon – tiaj mallongigoj estas relative facile asimileblaj al Esperanto.

## 2.4 Mallongigoj konsistantaj el inicialoj

Kelkaj tiaj mallongigoj estas elpensitaj por esti elparoleblaj kiel vortoj. Jen du ekzemploj de angla origino pri vortoj internaciigintaj: *Laser-o* devenas de *Light Amplification by Stimulated Emission of Radiation* (lum-plifortigado per stimolata elsendo de radiado). *Radar-o* devenas de *RADio Detection And Ranging* (per-radia malkovrado kaj distanc-mezurado). La vortoj, el kiuj tiuj mallongigoj estas formitaj, iel priskribas la fenomenojn, sed ne ekzakte. La kombinoj evidente estas konscie elpensitaj por ebligi funkciajn mallongigojn.

Svarmas inicialaj mallongigoj de organizaĵoj kaj institucioj. Kelkaj el ili estas tiel bone konataj, ke oni ne kutimas traduki ilin en Esperanton, ekzemple la brita radia kompanio BBC (British Broadcasting Corporation). Sed aliajn oni esperantigas, kiam oni skribas pri ili, ekzemple en la revuo *Monato*. Ambaŭ manierojn oni povas praktiki, sed ĉar oni ne scias, ĉu la legantoj konas la koncernan mallongigon, ĉiam estas rekomendinde klarigi ĝian signifon je ĝia unua apero en teksto. La konvenecon de tio ilustras la jena persona anekdoto:

Iam mi ricevis anglalingvan leteron, en kiu oni demandis, kion mi scias/opinias pri ESP. Mi ne estis certa pri la signifo de tiu mallongigo, kaj tion mi respondis. Sed mi aldonis, ke mi konas unu mallongigon Esp., kiu signifas “Esperanton”, do mi skribis, kio estas Esperanto, ke mi parolas ĝin, kaj kion mi opinias pri ĝi. Nur poste mi eksciis, ke la skribinto celis *Extra-Sensory Perception* (ekster-sensan perceptadon).

## 2.5 Kombino de pluraj tipoj

La supre menciita vorto *radaro* ne estas pura iniciala mallongigo, ĉar ĝi enhavas la du unuajn literojn de la unua vorto. Pluraj mallongigoj kombinas ekzemple inicialojn kaj silabojn. Unu tia mallongigo estas la origina varmarko *Nylon*, *nilono*, kies origina signifo laŭdire estas *New York LONdon* (kvankam tion ne konfirmas la konsultitaj vortaroj). Pri tio, kiel trakti en Esperanto nomojn de varmarkoj enigitajn en la ĝeneralan vortaron de Esperanto, ne fiksiĝis unueca praktiko. Eblas lasi ilin sensanĝaj – tion evidente preferas kelkaj inventintoj de tiaj nomoj. Ekzemple, Google insistis, ke en vortaro de la sveda lingvo ne aperu verbo signifanta “gugli”, do la firmao ne tolerus la Esperantan formon *guglo*. Eblas skribi la nomon per Esperanta ortografio, ekzemple *vindo*zo. Eblas traduki ilin, ekzemple nomante *vindo*zon *fenestroj*.

## 3 Kunmetado per dishakado kaj kungluado

### 3.1 La anglalingva sistemo

En la angla lingvo – kaj ne nur en ĝi – eblas kunmeti vortojn kungluante la komencon de la unua elemento kun la fino de la dua elemento.

Unu el la fruaj tiaj kunmetaĵoj kreiĝis por priskribi la miksaĵon de fumo kaj nebulo, kiu ofte ŝvebas super urboj kiel Londono kaj Losanĝeleso. La vorto estas *smog*, kunmetita de la komenco de *smoke* (fumo) kaj la fino de *fog* (nebulo).

En iu zoologia ĝardeno oni iam krucis leonon kun tigro. La rezultantan hibridon oni nomis per la vorto *liger*, konsistanta el la komenco de *lion* kaj la fino de *tiger*.

Manĝo, pri kiu oni ĉiam pli ofte parolas en amaskomunikiloj, kaj kiu plioftiĝas ankaŭ en hotelaj manĝejoj, estas nomata *brunch*, kunmetita el la komenco de *breakfast* (matenmanĝo) kaj la fino de *lunch* (lunĉo).

Por montri, ke tiu kunmeta tekniko estas praktikata ne nur en la angla lingvo, estu menciite, ke en la norvega lingvo, por priskribi la politikan sistemon de iuj landoj, oni povas uzi la kunmetaĵon *demokrat*ur, konsistantan el la komenco de *demokrati* kaj la fino de *diktatur*. Laŭ la norvega Vikipedio, kiu karakterizas la kunmetaĵon kiel “teleskopan vorton”, ĝia origino estas neklara: iuj atribuas ĝin al la franca sociologo Gérard Mermet, sed en sveda gazeto ĝi aperis jam en 1965, plume de sveda verkisto. La Vikipedio mencias similajn kunmetaĵojn en aliaj lingvoj: *Demokrat*ur germane, *democradura* hispane, *democratura* itale, *démocrature* france, kaj *democratorship* angle.

Tiu maniero fari kunmetaĵojn estas aparte produktiva en la angla (komp. *Brexit*, kiu feliĉe ekhavis la oportunan Esperantigon *brit-eliro*), kaj supozeble

ordinaraj anglalingvanoj kapablas analizi, el kiuj elementoj la kunmetaĵoj konsistas. Ĉar la angla nuntempe estas la plej granda liveranto de pruntvortoj, necesas diskuti, ĉu tiu modelo de kunmetado entute hejmas en Esperanto, kaj, se ne, kiel oni traktu en Esperanto la konceptojn esprimatajn per tiaj kunmetaĵoj (vidu 3.4).

### 3.2 Hibridaj radikoj en Esperanto

Radikoj, kies origino estas kombinaĵo de elementoj el diversaj lingvoj, tute ne estas fremdaj al Esperanto. Ni menciuj 4 ekzemplojn:

*Ĉano* = *chien* (fr) + *Hahn* (de)

*draŝi* = *dreschen* (de) + *thrash* (en)

*Forgesi* = *forget* (en) + *vergessen* (de)

*Ĝardeno* = *giardino* (it) / *jardin* (fr) + *garden* (en) / *Garten* (de)

Kvankam la strukturo de tiaj radikoj iom memorigas pri tiu de *smog*, *brunch* ktp., temas pri diversaj tipoj de vortoj, kreitaj por malsamaj celoj. Dum *smog* kaj *brunch* estas kreitaj por montri kompleksajn, plur-elementajn fenomenojn, *forgesi* kaj *ĝardeno* estas kreitaj por esti rekoneblaj kaj facile memoreblaj de kiel eble plej multaj homoj.

Kiel timigan ekzemplon mi menciuj, ke iu, volante “pli-universaligi” Esperanton, proponis, ke ni anstataŭigu la vorton *amiko* per *framtlo*: *fr* prenita el la germana *Freund* kaj la angla *friend*, *am* el la franca *ami*, la itala *amico* kaj la hispana kaj portugala *amigo*, kaj *tl* el la rusa *prijatel*. Tio estas pure skribotabla propono, ĉar nek germanoj, nek angloj, nek francoj, nek italoj, nek hispanoj, nek portugaloj, nek rusoj rekonus siajn vortojn por *amiko* en *framtlo*.

La hibrideco rilatas ne nur al la sonoj de la vortoj, sed ankaŭ al ilia skribo. La *ĝ* de francdevenaj vortoj kiel *aranĝi*, *horloĝo* ktp., skribe similas al la *g* de *arranger* kaj *horloge*, sed parole diferencas de la franca *ĵ* en tiuj vortoj. Male, la komenca sono de la Esperanta vorto *ĵaŭdo* samas al la franca origina *jeudi*, ĉar en tiu vorto la franca havas *j*.

Alia diferenco inter la du tipoj estas, ke dum la vortfara tekniko, laŭ kiu kreiĝis *smog* kaj *brunch*, konsistas el kungluado de partoj de malsamsignifaj radikoj, la Esperantaj hibridaj radikoj estas kungluaĵoj de partoj de radikoj samsignifaj en diversaj lingvoj, kaj tiuj kungluaĵoj principe estas nedivideblaj.

### 3.3 Kripligo de Esperantaj radikoj

Ĉu la aserto fine de la antaŭa alineo estas vera? Ĉu oni ne dishakas radikojn antaŭ la karesaj sufiksoj - *ĉj*- kaj -*nj*-? Jes, oni ĝenerale forhakas tion, kio

sekvas post la unua vokalo, kaj eblus aserti, ke tio estas la sola ne-aglutina trajto de Esperanto. Sed al tiel kripligita radiko eblas alglui nur karesan sufikson, neniam kripligitan parton de alia radiko.

### 3.4 Ĉu eblas adapti la anglan teknikon al Esperanto?

Mia respondo estas: ne, nek principe nek praktike.

Principe, la aglutineco de Esperanto malpermesas al ni enŝovi alian elementon en radikon. Tio favoras la konsideron de la Esperantaj radikoj kiel unuoj principe nerompeblaj. Kungluado ne de tutaj radikoj, sed de partoj de radikoj, ne estas vera aglutineco, ĉar aglutineco konsistas en algluado de elementoj rekoneblaj. Kungluado de dishakitaj partoj de pluraj radikoj pli similas al la CRISPR-tekniko, se vi permesas la komparon.

Praktike, la kunmetaĵoj rezultantaj el kungluado laŭ angla modelo apenaŭ estus rekoneblaj. Kungluaĵo de *fumo* kaj *nebulo* povus esti *fubulo*, kaj kungluaĵo de *matenmanĝo* kaj *lunĉo* povus esti *manĉo*, sed ĉu ordinara Esperanto-parolanto komprenus ilin? Mi dubas.

### 3.5 Importado de la anglaj kunmetaĵoj en Esperanton kiel radikoj

Tia importado certe taŭgas en iuj okazoj: *smogo* kaj *brunĉo* ja estas eblaj vortoj en Esperanto, sed kiel Esperantigi *liger*? Krome, per importado de kunmetaĵoj kiel radikoj perdiĝus la konscio pri la konsistigaj partoj de la fontolingva kunmetaĵo. Amasa invado de tiaj vortoj ŝveligus la vortaron de Esperanto. Jam *lunĉo* estas vorto, kiu signifas manĝon, sed kiu ne enhavas la elementon *manĝ*, malkiel *matenmanĝo*, *tagmanĝo* kaj *vespermanĝo*. Se al tio aldoniĝus *brunĉo*, ne-parolanto de la angla lingvo demandus sin, kio estas la diferenco inter *lunĉo* kaj *brunĉo*. Tia evoluo signifus grandan paŝon direkte al tiu “angligo de Esperanto”, kontraŭ kiu avertas Renato Corsetti, Sabine Fiedler k.a.

### 3.6 Alia strategio

Manke de pli bonaj solvoj, la plej bona strategio ŝajnas esti laŭeble traduki la kungluaĵojn:

*smog* = fumo-nebulo

*liger* = leon(o)-tigro

*brunch* = maten-lunĉo

*demokraturo* = demokratio-diktatoreco, demokratie vestita diktatoreco, ŝajn-demokratio

Tia procedo riskas krei multajn kunmetaĵojn kun streketo, kiuj estas malfacile manipuleblaj. Kompense ĝi provizas nin per pli da travidebleco ol havas la fontolingvo.

## 4 Konkludo

En ĉi tiu artikolo mi prezentas aferon, kiu afliktas min tiom, ke mi sentas urĝan bezonon konigi ĝin al publiko, kiu komprenus mian aflikton. Sciencistoj, kiuj publikigas studaĵojn, kutime kapablas tiri konkludojn el siaj studaĵoj. Mi tion ne kapablas fari ĉi-okaze. Ĉu mi do prokrastu la publikigon ĝis mi havus konkludon? Ne, ĉar mi sentas, ke jam urĝas prepari sin por inundo de vortoj el tipo, pri kiu ni ne scias, kiel trakti. Necesas fari ian lingvopolitikan paŝon por “kontraŭbatali” la inundon, sed mi ne havas la konvenajn ilojn. Mia konkludo do estas peto de helpo kaj kunlaboro por havigi la konvenajn ilojn.

## Pri la aŭtoro

Otto Prytz naskiĝis en norda Norvegujo (1943), eklernis Esperanton en 1955 en porblindula lernejo, studis hispanan lingvon, rusan lingvon kaj ĝeneralan lingvistikon, kaj laboris kiel lekciisto pri hispana lingvo en la Universitato de Oslo inter 1978 kaj 2005. Inter 2004 kaj 2022, li estis membro de la Akademio de Esperanto.

Retadreso: [pilotto@online.no](mailto:pilotto@online.no)

## About the author

Otto Prytz was born in northern Norway (1943), started learning Esperanto in 1955 at a school for the blind, studied Spanish, Russian, and General Linguistics, and worked as a lecturer in Spanish at the University of Oslo from 1978 to 2005. From 2004 to 2022, he was a member of the Academy of Esperanto.

## Sobre el autor

Otto Prytz nació al norte de Noruega (1943), aprendió esperanto en 1955 en una escuela para ciegos, estudió lengua española, lengua rusa y lingüística general, y trabajó como profesor de español en la Universidad de Oslo de 1978 a 2005. De 2004 a 2022, fue miembro de la Academia de Esperanto.

## Word-making by cutting and pasting

**Abstract:** This article begins describing and classifying some ways of forming new concepts by shortening words and word groups, paying special attention to word-making by “cutting and pasting”. Words formed with this composing technique, practised particularly in English, are somewhat similar to etymologically hybrid roots of words in Esperanto, but whereas these are unbreakable roots created in order to be easily recognised internationally, the former are created to express combinations of various concepts. From English many cut and pasted words are spread into other languages, be it by composing words with the same technique or by importing the compounds as lexical units. Word-making by cutting and pasting is not in accordance with the agglutinative character of Esperanto, but since many words which are rapidly coming into international use are created that way, it is urgently needed to examine whether it is possible to work out a system – or at least a strategy – of giving adequate Esperanto shapes of concepts expressed in other languages by cut and pasted compounds.

**Keywords:** Word-composing; Shortening; “Cutting and pasting”; Expressiveness.

## Formación de palabras mediante el “cortar y pegar”

**Resumen:** Este artículo empieza describiendo y clasificando algunas maneras de formar conceptos nuevos mediante abreviación de palabras y de grupos de palabras, dedicando especial atención a la formación de palabras por la técnica de “cortar y pegar”. Las palabras formadas según esta técnica, practicada sobre todo en inglés, tienen alguna semejanza con las raíces etimológicamente híbridas del esperanto; pero mientras que éstas están creadas como raíces irrompibles que sean internacionalmente lo más fáciles de reconocer posible, aquéllas están creadas para expresar combinaciones de conceptos distintos. Del inglés muchas palabras así formadas se han difundido a otras lenguas, sea según la misma técnica de composición, sea importando los mismos compuestos como unidades léxicas. La composición de palabras por el método de cortar y pegar no es compatible con el carácter aglutinante del esperanto, pero como así se van creando muchas palabras que rápidamente adquieren uso internacional, urge averiguar si es posible elaborar un sistema – o al menos una estrategia – para dar una forma adecuada en esperanto a los conceptos expresadas por tales palabras.

**Palabras-clave:** Composición de palabras; Abreviación; “Cortar y pegar”; Expresividad.